

& La Reveno de l' Filo:

< Rekante 16 el 32 batoj, entute 384 paŝoj dum 2 aŭ 3 minutoj. Verkis Antoni Grabowski. Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Olav Rajdistrozo, disduigante la strofojn.>

(#Melodio:

<2,3:4> (

/mi mi mi mi /so solfa mi i; /soso sofa mi i; /mi mi re re /mi milre do lTi; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o

)×12)+

(&Strofoj:

'1 /Post foresto /multe2jara (×:; /**Karbo kaj for/ĝist'** ;) /Venas filo /mia2 kara; (×:; /**Junaj viroj, viglaj viroj! ; /Iru plankon, dancu kun /granda em'!**)

'2 El migrado ĉiulanda Venas filo mia granda!

'3 En kabano mankis pano, Do elmigris li, infano;

'4 Nun revenas beljunulo Al hejmlando, al Vistulo!

'5 Kiel volus mi, patrino, Premi lin al mia sino;

'6 Doni volus mi festenon, Por saluti la revenon.

'7 Ve! ne mastras mi kabanon, Nek liberan havas manon;

'8 Mi, en mia propra domo, Estas kvazaŭ fremda homo.

'9 Ĉar al vi, fratino pli aĝa, Post kamplimo hejmvilaĝa,

'10 Brilas, laŭ destino dia, Stel' alia, pli radia —

'11 Do akceptu lin, fratino, Per muziko kaj per vino!

'12 Li ne vidu ĉe l' festeno, Kiel premas min — ĉagreno.)